

# Informilo de Decembro 2012

Numero 3, Decembro 2012

## UEA Intervenis en Esperanto ĉe UN en Ĝenevo

La 27-an kaj 28-an de novembro okazis la 5-a Forumo pri Minoritatoj en la Palaco de Nacioj, la Ĝeneva oficejo de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝia temo estis la plenumado de la Deklaracio pri la Rajtoj de Personoj Apartenantaj al Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj Minoritatoj, adoptita de la Ĝenerala Asembleo de UN la 18-an de decembro 1992. Kiel reprezentantoj de UEA, Cesco Reale kaj Stefano Keller alparolis la Forumon ĉe la tagordero pri malfacilaĵoj spertitaj en la praktikado de la rajtoj difinitaj en la Deklaracio.

Laŭ la regularo de UN en kunsido eblas paroli, krom en iu el la ses oficialaj lingvoj de UN, ankaŭ en iu alia lingvo, kondiĉe ke tion akompanu interpretado en unu el la oficialaj lingvoj fare de la intervenantoj. Tia interveno okazis en la 2-a Forumo en 2009, al kiu la ĉefreprezentanto de UEA Stefano Keller invitis reprezentantinon de la Svisa Federacio de Surduloj, kiu faris sian intervenon gestolingve, kun akompana voĉa interpretado al la franca (video: <http://goo.gl/BmZID>).

La alparolo de UEA en la 5-a Forumo okazis en Esperanto: Stefano Keller legis kaj Cesco Reale interpretis hispanen, alineon post alineo. UEA atentigis pri la daŭra lingva diskriminacio ĉe laborpostenaj ofertoj, kiu hodiaŭ estas ankoraŭ malpli priatentata kaj malaprobata ol alispecaj diskriminacioj menciitaj en la Deklaracio pri la Rajtoj de Minoritatoj. Dum postkunvena interparolado la sendependa fakulo de UN pri minoritatoj, s-ino Rita Izsák, gratulis pro la interveno de UEA kaj pozitive esprimiĝis pri Esperanto.

“Laŭ mia scio, tiu ĉi estis la unua esperantlingva interveno de UEA ĉe UN”, supozas Stefano Keller, kiu estas ankaŭ la estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj.

Multaj intervenantoj de minoritatoj menciis lingvorajtajn problemojn. Reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj substrekis la neceson traduki la Deklaracion en laŭeble plej multe da lingvoj kaj disvastigi ĝin tutmonde.

La evento donis okazon al la komisiitoj de UEA rekontakti malnovajn konatojn el aliaj NRO-oj kaj ekhavi novajn kontaktojn. Okazis ankaŭ laborkunsido de la tuta 5-membra UEA-teamo – Nicole Margot, Verena Graf, Adrian Tanner, Cesco Reale kaj Stefano Keller – por pritrakti la ĝisnunajn kaj plani la estontan agadon de UEA ĉe la Ĝeneva UN-sidejo.

Teksto kaj sonregistraĵo de la interveno de UEA: <http://www.lingvaj-rajtoj.org/eventoj>  
ESPERANTO POR UN INVITAS AL KUNLABORO

Lastatempa komuniko de la laborgrupo de UEA ĉe UN en Novjorko anoncis, ke la naskiĝanta organizaĵo Esperanto por UN (EUN) nun volas krei pli sekuran strukturon por daŭrigi sian laboron. Jam la organizaĵo havas sian propran retpaĝaron, [www.esperanto-un.org](http://www.esperanto-un.org), siajn ĉiujarajn seminariojn ĉe la Universalaj Kongresoj, sian agadgrupon en Novjorko, kaj centon da membroj tra la tuta mondo. Nun necesas krei iom da strukturo. Unuavice, oni deziras starigi internacian estraron, kun la jenaj celoj, laŭ la anoj de la laborgrupo:

- plilarĝigi nian informadon al esperantistoj pri la laboro de UN
- krei instrumaterialon pri UN por Esperanto-kursoj kaj por instruistoj
- plivastigi nian retpaĝaron
- elserĉi la financajn rimedojn, kiujn ni bezonas por plenumi la laboron
- pliprofundigi nian informlaboron al ĉiuj ĉefaj organoj de UN tra la mondo
- serĉi kunlaboron kun aliaj similcelaj neregistaraj organizaĵoj
- intensigi fakulan interesigon pri la uzo de lingvoj ĉe UN
- starigi komunikkanalojn por niaj membroj
- peti aliĝon al UEA kiel faka asocio.

La laborgrupo, laŭ sia alvoko, “serĉas homojn (de ĉiuj aĝoj kaj el ĉiuj landoj) kun sperto, lerto kaj entuziasmo por transpreni taskojn en tiu ĉi agado.” La mesaĝo de la laborgrupo aldonis: “Bonvolu mem proponi vin kaj proponi ankaŭ aliajn homojn, kiuj viatakse povus helpi nin. Skribu al: [info@esperanto-un.org](mailto:info@esperanto-un.org). Ni serĉas estraranojn, redaktorojn, administrantojn, helpantojn.”

## La Ĝenerala Sekretario Salutis Okaze de la Internacia Tago por Toleremo 16 Novembro

“Konstrui toleremon kaj komprenemon estas fundamente necese en la dudekunua jarcento. En ĉiam pli tutmondiĝanta medio – en kiu socioj fariĝas pli diversaj – tolero estas ŝlosilo por kunvivado.” Tiel mesaĝis la Ĝenerala Sekretario de UN, Ban Ki-moon, okaze de la Internacia Tago de Toleremo la 16-an de novembro. “Tamen,” li aldonis, “tolero estas konstante kontestata. Fronte al ekonomiaj kaj sociaj premoj, iuj celas ekspluati timojn kaj emfazi diferencojn por hejti malamon al minoritatoj, enmigrantoj kaj malavantaĝuloj. Por kontraŭi la kreskon de senscio, ekstremismo kaj politikaj alvokoj bazitaj je malamo, la modera majoritato devas levi sian voĉon favore al komunaj valoroj kaj kontraŭ ĉiuj formoj de diskriminacio.” Temas pri pli ol paca kunezkisto, li deklaris: “Vera toleremo postulas la liberan fluan de ideoj, altkvalitan edukadon por ĉiuj, respekton al homaj rajtoj, kaj la komuna sperto de kulturoj por reciproka komprenado. Dum ni antaŭenigas tiujn valorojn, ni trovu forton kaj gvidon en la Universala Deklaracio de Unesko pri Kultura Diverseco.” La Ĝenerala Sekretario finis sian mesaĝon per jenaj vortoj: “Toleremo estas kaj antaŭkondiĉo de paco kaj motoro de kreemo kaj novigo. En nia daŭre pli kunligita mondo, subteno de toleremo estas la ĝusta vojo por konstrui la harmonion, kiun ni bezonas por fronti preme urĝajn defiojn kaj certigi pli bonan estontecon.”

*Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:*

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

[www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org)

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

